

Joseph Freiherr von Eichendorff,  
Melankolio

*tradukita de Henryk Wenzel*

Mi vagis boske, vale  
en tarda frisko for,  
ploremis akvofale  
profunde en la kor'.

Kaj el pratempaj fruoj  
vekiĝe val' salutis  
kvazaŭ de foraj fluoj,  
kiujn la nokt' englutis.

La suno dronis fore,  
apenaŭ brizo ventis,  
maldormis mi dumhore,  
solece kamp' silentis.

*Traduko de la Germana poemo "Wehmut" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (\*1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de Henryk Wenzel.*

*Arg-1006-2035 (2014-05-11 12:06:30)*